Malfermita leciono en Lesja Ukrainka Orienteŭropa nacia universitato

La 14. 12. 2018 en Lesja Ukrainka Orienteŭropa nacia universitato (u. Lucjk) okazis malfermita leciono “Internaciaj lingvoj. Esperanto” de profesoro Nina Daniljuk, dediĉita al la naskiĝtago de Ludoviko Zamenhof. Ĝi estas leciono de la ordinara kurso “Enkonduko al lingvistiko” por la studentoj de fakoj “ukraina lingvo kaj literaturo”, “pola lingvo kaj literaturo” (filologia fakultato kaj ĵurnalistiko) kaj samtempe leciono de la speciala kurso “Artefaritaj lingvoj kaj interlingvistiko” por la studentoj de fakoj “angla lingvo”, “franca lingvo”, “aplikata lingvistiko” (fakultato de eksterlanda filologio). La partoprenintoj spektis retan prezentaĵon pri etnaj kaj artefaritaj lingvoj, kiuj rolis kiel internaciaj en diversaj tempoj kaj diversaj mondopartoj. Ili eksciis pri fondigo de E kaj E-movado, pri E-organizaĵoj, pri E-periodaĵo kaj literaturo, pri adeptoj de E en Ukrainio kaj esperantologio kiel parto de scienco “interlingvistiko”. La lecionon partoprenis prezidanto de lucka E-klubo “Arbara kanto” kaj prezidiano de UkrEA Niko Voloŝin, kiu rakontis pri eldonado de E-libroj en Ukrainio, pri planoj. Por ekspozicio estis montritaj materialoj de la universitata E-centro. Studentoj ekinteresiĝis pri E kaj estis decidite komenci elementan kurson de E en februaro.